The treasurer is unable to participate this time, but the board briefly reviews a draft report he provided for us to review in his absence. Our budget is still expected to be met, although many of our income pieces, such as investments and donations, are expected to come later in the year, as they usually do. The topic of fundraising campaigns is again brought up. Bill reports regarding the planned sale of our plot(s) of land in El Paso, TX. Bill has been in communication with the potential buyers, and he is still waiting on further information from them. Bill will follow up on this later this month. Phil clarifies that, due to the way E-USA's accounts are organised, any donation to the General Fund will proportionally benefit all other funds via investment income. The topic is brought up again of how to simplify donations, especially to the general fund. This is a project Tim B has previously spoken on, one which the board acknowledges as important, and it is currently a matter of resources and priorities.

President's Report

See President's Report. Action Item: Phil will organise a

brainstorming meeting with William Morton at his pleasure, regarding publicity. Action Item: Phil will organise a meeting with ESF. Tim R and Jane offer to help out with some of Fred's tasks as he recovers. Action Item: Phil will contact Brian Harmon to join the board of directors groups.io mailing list.

New Business

List of Responsible Parties

The board moves on to discuss a plan for organizing and tracking action items. A shared spreadsheet called "Action Items" is brought up. Many other systems used for non-profits require quite the computer program to track our emails, zoom meetings, and all other board communications for action items, which seems like overkill. Each month, the secretary would add action items from meeting minutes to the spreadsheet. However, Bill clarifies, and several others agree, that we also need a list of responsible parties for committees, but also for specific interests. If a member contacts the Central Office asking who to talk to regarding a particular task or interest, we need a list the CO could refer to. Action Item: Phil will create a Responsible Party list for the CO.

Concluding

The board discusses again how to take further steps regarding CRM software.

Appendix A: President's Report

We have a new leader for the Publicity Committee. The new chair is William Morton who has experience with non-profits. Also serving for publicity are Charles Germany, who is experienced with social media, and Alex Miller, who remains as our leader for videos. William's first request is to hold some brainstorming meetings for publicity. The board and other leaders will assist him in this great step forward.

Our new volunteer coordinator is Marcus Griep. We will always need people to step up to fill new roles and do new tasks, so thank you Marcus!

The board, committees, and other leaders will work closely with the Publicity Committee and the Volunteer Coordinator.

There will be a joint meeting between leaders of Esperanto USA and Esperantic Studies Foundation to prepare the plans for 2022 and strengthen our cooperative efforts to support the Esperanto community. We will plan that date in the next few days following the board meeting today, August 14, 2021.

Plans for the Community Groups are moving along well, despite some notable absences and illness of key players. Many of the details have been worked out and we look forward to a launch within the month.

Amike, filipo
Phil Dorcas, president, Esperanto USA

Kolofono

Redaktoro/Editor: HOSS FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitaĵajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.en>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.

Raporto el Seatlo

loke • Arlyn KERR



La loka klubo en Seatlo renkontiĝis vidalvide la 7-an de Marto, 2020. Ekde tiam ni zumis ĉiumonate. Sed fine la ŝtat-guberniestro anoncis la finon de la pandemio, kaj ni havis veran renkontiĝon la 3-an de Julio, 2021. Dek unu homoj partoprenis.

Laŭ la peto de E-USA, ni diskutis la celon de nia grupo. Ni konsentis ke la ĉefa celo estas amuziĝi kaj ekzerci nin per Esperanto. Iam ni helpas fremdajn

vizitantojn kiuj kontaktas nin, per lito aŭ manĝo aŭ montrado de la urbo. Ni montras kaj dividas inter ni librojn kaj ĵurnalojn, kaj ni informas aliajn en la grupo pri kursoj, eventoj, artikoloj, kaj utilaj interretaj rimedoj. Kiam eble, ni renkontiĝas en publika loko, kun Esperantaj ŝildoj, por ke preterpasantoj vidu ke Esperanto ne estas mortinta lingvo.

En la pasinteco ni propagandis pri Esperanto en foiroj kaj dum la jara “fremda lingva tago” de la universitato por altlernejoj. Kaj ni iam gvidis ĉiusemajnajn malgrandajn neformalajn kursojn por progresantoj. Sed nun ni pensas ke Interreto bone instruas, kaj ke ni plej bone helpas per doni la ŝancon paroli la lingvon inter amikoj dum niaj kunsidoj. Ni konsentis ke ni estas kontentaj pri ĉio kiun ni nun faras; neniuj volis aldoni agadojn. Ni estas dankemaj al Zumo, sed estis tre ĝojige revidi unu la alian kaj interbabilu persone anstataŭ virtuale.

Paco


mikronovelo • Maurizio GIACOMETTO

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj estu precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Li ĉiam scivolis, kia sperto ĝi estus. Nun li sciis.

Trankvileco.

Eĉ la brueto de la ĉeestantoj, parencoj kaj amikoj, ne ĝenis lin. Ne povinte aŭdi ŝian voĉon, li ne certis, ĉu la patrino ĉeestas. Tamen, ŝi ĉiam parolis mallaŭte. Eble estis la edzino, kiu parolis. La sono venis de alia angulo en la ĉambro, kaj estis tro da homoj por certiĝi.



La okulojn fermitaj, kompreneble, li “rigardis” per sia memoro la tutan ĉambron, kaj sentis feliĉon. “Eble tiu estas la vera paco,” li pensis, “tia, kian mi serĉis la tutan vivon.”

Dume, sepultistoj finis la sigelfermadon de lia ĉerko.



Maurizio GIACOMETTO

Malkabeinta esperantisto, “Rico” estas revema verkemulo, senbrida legemulo kaj senhonta kvizemulo. Demisiinte de sia laboro kiel taksisto de la gefiloj, li nun havas multe pli da tempo por Esperantumado. Li loĝas apud Londono, Britujo.


<mbaesperanto@btinternet.com>

Feliĉo

Legendo

beletre • Lesja UKRAJINKA, Viktor PAJUK

Verkis Lesja UKRAJINKA, 1896; Elukrainigis Viktor PAJUK, 2021



Lesja UKRAJINKA.

Ĉi tio estis komence de la jarcentoj. La nove kreita mondo brilis per mirinda beleco, estis harmonio ĉie, klara, plena vivo. Dia revo floris, luksa kaj milda. La homa vivo flosis en kvietaj ondoj kaj kunfandiĝis kun tiu sonĝo en unu helan, trankvilan maron. Estis granda paco sur la tero, kaj homoj vivis en paco. Pasis longa tempo.

La malbona spirito dormis en subtera lando. Li dormis dum multaj jarcentoj, kaj lia dormo estis malbona. La malbona spirito vekigis kaj ekkriis: “Malbonaj sonĝoj turmentas min! Mia animo estas disŝirita, mi ne havas pacon! Kaj tie, sur la tero, regas klara trankvilo, la sonĝo de mia malamiko floras kaj ŝvebas – kaj nenio konfuzas ĝin. Ĉu mi portu mian propran fajran sopiron, aŭ ĉu mi kaŝu mian malhelan malĝojon? Ne, mi ĵetos malĝojon en la korojn de la plej karaj infanoj de mia malamiko, mi disvastigos malĝojon super ili per nigra vualo, kaj la sonĝo de mia malamiko malheliĝos.”

La malbona spirito eliris el la sino de la tero per nigra

fumo kaj per fajra nubo ŝvebis super la tero. Li flugis super la valoj, kie la ora greno moviĝis, kie la abundaj arboj klinis teren pezajn branĉojn. La malbona spirito malsupreniris tien, kaj la greno finbrulis, kvazaŭ de fajro, la fruktoj sur la arboj nigriĝis, la herbo flaviĝis, la floroj velkis kaj la dezerto ekstaris. Homoj kaŝis sin de la fajra spiro en la kavoj kaj kavernoj kaj ĝemis: “Malsato, malsato!” La malbona spirito revenis al la submondo kaj atendis.

Cent jaroj pasis. La dezerto delonge transformiĝis en grandiozan landon, la ora greno denove ondiĝis, la abundaj arboj denove klinis teren pezajn branĉojn. Nova generacio de homoj rakontis fabelojn pri la antaŭa malsato, sed tiuj rakontoj komencis esti forgesitaj. La sonĝo de Dio prosperis, kiel antaŭe, kaj paco estis sur la tero.

Sed la malbona spirito ne dormis. Li diris al si: “Mi ekrigardu la laboron de miaj manoj!” Li leviĝis de la sino de la tero per griza nebulo kaj per malvarma nubo ŝvebis super la tero. Li flugis super la montoj, kie paŝtis grandaj ŝafaroj, kie disvastiĝis homaj tendaroj, kie li aperis per densa mallumo, per terura pesto. Brutaroj pereis, homoj formortadis, terura krio ruliĝis super la montoj: “Morto, morto!” Ŝafaroj malaperis, tendaroj malpleniĝis ... La malbona spirito revenis al la submondo kaj atendis.

Cent jaroj pasis – sur la tomboj de homoj mortintaj pro la pesto verdiĝis printempa herbejo, kaj iliaj posteuloj trankvile vagis tra la montaj paŝtejoj, gaje ludis flutojn, kunvokis sennombrajn gregojn. La tendaroj blankiĝadis per tendoj, estis vivo ĉie. Neniu menciis la plagon. Dia sonĝo prosperis, kiel antaŭe, kaj estis paco sur la tero.

La malbona spirito sidis en la submondo kaj pensis. Kaj li kreis per sia penso strangan estaĵon. Ĝi estis tiel brila kiel aŭroro, kaj ŝanĝis sian aspekton ĉiun minuton kiel fajro. La malbona spirito donis al ĝi vivon kaj nomis ĝin: *feliĉo*. Li prenis ĝin sur siajn fortajn flugilojn kaj flugis kun ĝi alte super la tero. Estis malluma nokto, la tendaroj dormis, nur junaj paŝtistoj sidis ĉirkaŭ la fajro – la paŝtistoj ne

dormis nokte, – ili kantis. La plej juna ludis fluton, rigardis stelojn, kaj liaj okuloj estis tiel trankvilaj kiel la steloj.

Granda brila stelo ruliĝis de la ĉielo. La paŝtisto forlasis la fluton kaj ekkaptis sian koron. Li vidis la stelon, kaj ĝi frapis lian koron. Li laŭte kriis: “Rigardu, rigardu!” – kaj ĉiuj rigardis tien, kien lia mano montris – tie falis la stelo. Ĝi falis sur altan monton, kaj sur la monto ekbrilis lumo, kiu brulis kaj ekscitis la koron. La paŝtisto diris al siaj fratoj: “Ni iru tien!” – kaj ĉiuj iris al la lumo. Ĉiuj vidis en la lumo tion, kio estis al ili kara dum la vivo, kaj ĉiuj vidis alie. Ili fartis tiel, kvazaŭ fajro brulis en iliaj animoj. Ili iris plu, kaj la lumo ekflamis. Ili iradis, pikis siajn piedojn per dorna herbejo, disŝiradis siajn vestaĵojn sur la akraj dornoj, la sango estis sur iliaj spuroj; ili iris kaj falis unu post la alia, ĉar la forto forlasis ilin. Kaj la klara, stranga estaĵo pli kaj pli foriĝis, pli ŝanĝiĝadis kaj malaperis en la nebulo. Venis la tago, sed ĝi ne revenis, kaj neniuj trovis ĝin.

Denove vesperiĝis, kaj la paŝtistoj kantis. Ili kantis: ”Ho feliĉo, ho klara, perdita feliĉo!” Kaj tiuj kantoj venenis la korojn de ĉiuj homoj. Ĉiuj volis feliĉon, sed neniuj konis ĝin, ĉiuj volis vidi ĝin, havi ĝin por momento kaj poste morti, ĉar ĝi fariĝis kara al ili pli ol la vivo.

Kaj ĉiuj vidis ĝin, almenaŭ en sonĝo, almenaŭ por momenteto. Ĝi rigardis al unu per amantaj okuloj, brilis per oro al alia, brilis per la lumo de gloro al alia. Ĝi sorĉis ĉiujn por ĉiam, kaj ĝiaj ĉarmoj estis venenaj. Ĝi falis en koron per fluganta stelo, kaj la koro ekbrulis. Kiu vidis ĝin unufoje, tiu ne forgesis

ĝin ĝis sia morto. Infera fajro vekigis en la animoj de ĉiuj homoj. Ĉiuj serĉis feliĉon, ĉiuj volis havi ĝin tutan en siaj manoj. Por tio ili fordonis ĉion la plej multekostan, ruinigante sin kaj aliajn, larmoj kaj sango verŝis rivere je ĝia nomo. Kaj feliĉo flugis ĉirkaŭ la mondo kiel stelo, fulmo, vaganta lumo kaj ne haltis ie ajn delonge, kaj neniuj havis ĝin tutan en siaj manoj.

Kaj granda krio aŭdiĝis tra la tuta lando: “Bonŝancon! Feliĉon!”

De tiam ne estis klara paco sur la tero, la brila sonĝo de Dio malheliĝis.

Kaj la malbona spirito konsoliĝis per sia laboro.



Pri la aŭtoro

Larisa KOSAĈ (1871-1913), monde konata kiel Lesja UKRAJINKA, apartenas al al triopo de la ukraina poezio kune kun Taras ŜEVĈENKO (1814-1861) kaj Ivan FRANKO (1856-1916). Ŝi verkis ankaŭ dramojn kaj soci-politikajn artikolojn. En 1971 aperis ŝia E-poezia verkaro *Liriko*, kompilita de Nadija ANDRIANOVA-HORDIJENKO (1921-1998). Dum multaj jaroj la prozo de Ukrajinka estis preskaŭ nekonata, ofte pro politikaj kialoj (ŝi arde kritikis socialismon kaj invadon de la rusa lingvo en Ukrainujon).

I. Franko alte pritaksis la agadon de Ukrajinka, skribinte: “De la tempo de T. Ŝevĉenk-a Testamento, Ukrainujo ne aŭdis tian ardan poezian vorton kiel el la buŝo de ĉi tiu malforta, malsana junulino.”

Esperanto in Little Free Libraries

informado • Chuck MAYS



A Little Free Library in Detroit, Michigan.

One way of promoting Esperanto is through Little Free Libraries. Most likely there are some near you. Check out the **Little Free Library Map** <<https://littlefreelibrary.org/ourmap/>> to find them.

Our local group decided to put 100 copies of the **Esperanto Mini-Course** <<https://bit.ly/2Xd0hqD>> in free libraries in the Raleigh, Durham, Chapel Hill area of North Carolina. It has been a fun activity driving around to find libraries, walking to close-by neighborhoods to combine exercise with locating a library, and even getting help from non-Esperanto-speaking family members.

Why the *Esperanto Mini-Course*? We wanted a low-cost book, and most of the small books we considered are out of print. So, we ordered 100 copies from the Esperanto Association of Britain. At this point you are probably wondering how much it cost and where we got the money. With shipping, the booklets cost a little over \$1 a copy. Three of us (Murray Merner, Tim Gee and Chuck Mays) pooled our resources to purchase the booklets.

Before putting the booklets in the libraries, we added a printed label to the front cover with links to more information about Esperanto and with a QR code to a

web page. The page recommends esperanto.net as a place to find more information and has a link to an anonymous and voluntary survey that asks a few questions like: “Did you know about Esperanto before borrowing the booklet?” You can see **the page on our website** <<https://bit.ly/3C9Dfj0>>.



Our book label.

What do we expect from this project? If one person learns Esperanto and becomes an active member of our local Esperanto community, it will have been well worth the effort. We realize that not all local groups, and certainly someone alone, might not be able to finance a project like this. So, it seems reasonable to request financial support from Esperanto-USA. After all, promoting Esperanto is a main purpose of the organization.

We don't yet know the results of putting 100 booklets in little free libraries other than to report that when we have checked libraries a few days later, the booklet is gone! We will report more as we get survey results.

Chuck has offered to write further *informado* columns with similar ideas for promoting Esperanto. Please contact him at the email address below with reports of what you've done to promote the language. Please include pictures, descriptions of your successes and failures, and even ideas you haven't tried yet.



Chuck MAYS

Chuck is an electrical engineer and long-time esperantist from Raleigh, NC. Among his other jobs in Esperantujo, he is Executive Director of the Esperantic Studies Foundation.

<Charles.o.mays@gmail.com>

La artiste sentema tradukmaŝino


traduku! • HOSS FIROOZNIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.

En tiu ĉi numero ni revenas al la teksto el № 2021:2, eltiraĵo el la humura rakonto *La tradukmaŝino* de KONISI Gaku. Ĉi-foje partoprenis la kutimaj kulpuloj kuraĝuloj: BS, CL, MH, RN, kaj SB. Koran dankon al ili pro iliaj eltrovemaj proponoj!

Estus bele havi kapablan tradukmaŝinon por Esperanto. Se en 1976

esperantistoj povintus scii, kiom kapablaj estos niaj nuntempaj tradukiloj, ili sendube mirus. Foje tiuj iloj funkcias surprize bone, sed tro ofte ili ankoraŭ fuŝas eĉ la plej simplajn tekstojn – kaj tute mankas al ili la “artista sentemo kaj verva eltrovemo” necesa por traduki beletraĵojn. Do ne timu, protoplasmaj tradukemuloj: vi sendube restos bezonataj almenaŭ kelkajn jarojn plu!



La sciencfikcia novelaro *Vage tra la dimensioj* (1976) de KONISI Gaku.

Interesaj parolturnoj en la teksto

- **kontenta mieno** — Sufiĉe simpla kaj kutima esprimo en Esperanto, sed de niaj kvin tradukintoj – ĉiuj sendepende laborinte, supozeble – alvenis samnombro diversaj proponoj:

- *a satisfied expression*
- *an air of contentment*
- *a pleased countenance*
- *a contented look*
- *a satisfied face*

Mirinde, ĉu ne? Ĉiu traduko bone redonas la ĉefan ideon, sed kun aparta nuanco.

Amuze formalan guston havas *a pleased*

countenance (MH), kiu eble ja konvenas al la iom fabeleca tono de la rakonto. Ankaŭ rimarkinda estas *an air of contentment* (CL) pro tio, ke ĝi ne nur kaptas la ĝustan sencon, sed prezentas ĝin en formo tre natura.

- **mergis sin (en sofon)** — La angla ŝajne ne permesas tro rektan tradukon de tiu metaforo: oni povas *immerse oneself* en akvon, certe, aŭ (figure) en laboron, sed *immersed himself in the sofa* sonas iomete stranga. Kelkaj tradukintoj elektis la similencan kaj tute naturan *sank into the sofa*; aliaj preferis la verbojn *nestled* kaj *plopped down*.
- **ĉio iris bone** — Ĉiuj tradukintoj konsentis pri *everything went well* aŭ simile; BS proponis ankaŭ la adverbon *swimmingly*, kiun mi tre ŝatas.

Mankis konsento pri la verbotempo, tamen, verŝajne pro tio, ke en Esperanto ni emas uzi simplan verbotempon tie, kie la angla preferas malsimplan. La tuta rakonto okazas en is-tempo (preterito), do estas ne tuj klare, ĉu *iris* en tiu frazo estu *went* aŭ *had gone*. En la kunteksto de la rakonto, tamen, la frazo priskribas aferojn jam pasintajn, do eble *had gone* estas pli konvena.

- **TRADUK-IKSO** — Kiel kreemaj proponoj! RN elpensis *TRANS-O-LATOR*, ĉar “ĝi samtempe pensigas pri la vorto *translator* [same kiel *tradukikso* pensigas pri *tradukisto*] kaj ankaŭ sonas ‘robota’ aŭ ‘maŝineca’, kiel ia ‘aparato el la estonteco’”. CL, inspirite de la X-havantaj nomoj de Unix-derivitaj operaciumoj (ekz. *IRIX*, *Linux*, *XENIX*) elektis *TRADUX*. Aliaj proponis *Translate-X* (MH), *TRANS LEX* (SB) kaj la belan *eTransl8* (BS).
- **(li sukcesis) provizi (la maŝinon)** – Denove alvenis tuta tezaŭro da proponoj: *imbued*, *equipped*, *gave*, *provided*, kaj eble plej plaĉe, *endowed*.
- **artista sentemo** – Preskaŭ ĉiuj proponis

artistic sensibility, tute pravigeble, sed eĉ pli plaĉas la propono de MH, *artistic flair*.

- **verva eltrovemo** – Jen alia frazo kun multaj eblaj redonoj. Niaj tradukintoj proponis *elegant inventiveness, lively resourcefulness, vehement inventiveness, kaj insatiable trenchant for discovery*.
- **plej delikataj (esprimoj en beletraĵoj)** – Oni proponis *refined, sensitive, kaj delicate* – ĉiuj bonaj, sed pro la kunteksto, eble plej plaĉas la propono de MH, *nuanced*.
- **lia inventista memfido** – *his inventor's ego; his confidence in his inventive abilities; his creative confidence; he was sure of his prowess as an inventor*.
- **(lia maŝino) cedos al neniŭ alia** – *was second to none; would take a back seat to no others; would become the gold standard*.
- **ŝovi sin antaŭ (la publikon)** – *to present himself before; to burst onto the stage; to thrust himself into the community; to woo the audience; to grab the public's attention*. Ĉu eble ankaŭ *to debut*?
- **la verda publiko / la Belartaj Konkursoj de UEA** – Ambaŭ frazoj postulas iom da kono de la Esperanta kulturo. Sed kiom ni rajtas atendi de anglalingva leganto?

Kelkaj tradukintoj elektis reteni la metaforon pri verdeco (ekz. *the green-star public, green community* – MH eĉ sprite ludis per *limelight*), sed aliaj elektis klarigi (ekz. *the Esperanto audience*). Kompreneble, la ĝusta aliro dependas de la celata legantaro.

Pri *Belartaj Konkursoj*, preskaŭ ĉiuj klarigis (ekz. *Literary/Fine Arts Competition*) sed multaj ial elektis konservi la siglon *UEA*. Interese. Ĉu leganto komprenus, kion signifas *UEA*, se tiu bezonas klarigon pri la *Belartaj Konkursoj*? Aliflanke, eble klarigo de tiu detalo ne gravas por ĝui la rakonton, do ne indas klarigi ĝin.

Interese, RN faris la inverson de preskaŭ ĉiuj

aliaj: li klarigis *UEA* sed lasis *Belartaj Konkursoj* senŝanĝa, aludante al ĝia signifo per la verbo *compete*. Sprite.

La “sinteza” traduko

Jen provo krei sintezan tekston uzante la plej interesajn proponojn (elektitajn laŭ mia propra, arbitra, kaj plene kontestebla gusto) kun kelkaj aldonoj:

He sank into the sofa with an air of contentment, lit a cigarette, and blew a smoke ring. Everything had gone swimmingly. On the table before him lay a neatly typed manuscript, translated by his eTRANSL8.

He was a young electrical engineer. For the past year he'd poured all of his energy, his talent, and his knowledge of electronics and linguistics into the construction of the Esperanto translation engine. He now felt that he'd achieved a measure of success, having endowed the machine with a capacity for thought, an artistic flair, and a lively creativity — that is, with the qualities needed to translate the most nuanced expressions in literature. The device functioned in both directions, from Esperanto into his native language and vice versa. It could even translate rhymed verse.

A few other translation engines had attracted some attention, but his inventor's ego maintained that eTRANSL8 would prove second to none in its expressive flexibility. His eyes followed the dissolving smoke ring as he dreamt of the glories that his invention would bring.

He hadn't taken on this project for the sake of profit. Instead, his ambitions were aimed at a loftier goal, namely, to achieve fame as a respected Esperanto translator. Becoming the second Kabe or another Kalocsay had long been his dream.

The first step in his debut on the Esperanto stage was to enter the literary competitions of the World Esperanto Association. Indeed, that's what the manuscript on the table was for. He must win First Prize. Only that could make up for his great labors thus far.

Por tiuj, kiuj volas kompari la tradukojn kaj vidi ĉiujn detalojn, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de la proponoj.



La nova defio

La jena fragmento, iom redaktita, venas el la krimnovelo *Kiu pafis al Pipulo?* de Johán VALANO (alinome Claude PIRON) aperinta en lia novelaro *Ĉu rakonti novele?* (1986).

“Rapidu! Pipulo havis akcidenton!”

“Kio?”, “Kie?”, “Ĉu Pipulo?”, “Kio okazis?” Tumulto skuis la tutan vilaĝon, ordinare plej pacan. Demandoj sagis ĉiudirekte, sed la junulino ĵus biciklis tiel rapide, ke ŝi ne plu havis spiron por respondi.

“Ĉe Kravina,” ŝi fine prononcis, kaj post du profundaj spiroj ŝi aldonis: “Apud la arbarlimo. La traktoro renversiĝis sur lin.”

Kiam ili alvenis, li ne plu estis savebla. Pipulo kuŝis jam plurajn horojn morta. Sed al la ĝendarmoj, alkurintaj tuj poste, baldaŭ evidentiĝis, ke ne traktorrenverso mortigis la maljunan kamparanon. La traktoro ja renversiĝis nur, ĉar Pipulo ne plu regis ĝin. Pafite al la kapo kaj brusto, kiel li povus ĝin regi?

La vilaĝo estis konsternita. Pipulon oni ne speciale ŝatis. Senedzina, seninfana, ĉiam inklina grumbli, li ne montriĝis aparte simpatia al la lokanoj, kiuj emis riproĉi al li troan konservemon. Sed ke vilaĝanon, eĉ ne popularan, oni mortpafis, tio estis malfacile digestebla fakto.

* * *

Kiam detektivo puŝis la pordon de la gastejo, ĉiuj eksilentis. Forte sentanta, ke ĉiuj rigardoj koncentriĝas sur lin, li iris al la bufedo kaj mendis bieron.

“Silenta etoso,” li diris al la kelnerino.

“Streĉita,” ŝi simple respondis. “Vi verŝajne ne scias, ĉar vi haltis nur preterpase, sed mortiga akcidento okazis hieraŭ.”

“Jes, mi scias. Mi venas por enketi,” li diris.

“Se vi venas enketi, vi ne devos serĉi longe,” kriis de apuda tablo juna fortegulo, kies mentono elstaris agreseme.

La redakcio (trovu ĝian adreson en la kolofono) akceptos vian proponon **ĝis la 15-a de Novembro**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ ne volas. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu** proponon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

Al krokodilantoj

el la arĥivo • Mark MANDEL

Dankon al Kinen CARVALA pro lia trovo kaj provlegado de la jena poemo en niaj enskanitaj arĥivoj. Ĝi unue eldoniĝis antaŭ 50 jaroj en *JEN* 1970:1, la bulteno de la Junularo Esperantista de Nordameriko.

*Ni parolu Esperante!
Ĉar kunveni estus vante
se, en niaj verdkunsidoj,
stelkunrajdoj, E-kunridoj,
kunparolus ni per tiu
lingvo, kiun el ni ĉiu*

*uzas en la laborejo,
strato, hejmo, amorejo,
forlasante la okazon
turni nin en stel-emfazon,
tion ne utiligante
kion ni, aŭ elegante,
aŭ haltante, aŭ eĉ fuŝe,
rare povas uzi buŝe.
Ĉion kune do farante,
ni parolu Esperante!*

Senintencaĵoj esperantaĵoj


Kaj



Leganto Steve EICHBLATT sendis la jenan foton el Novjorko. Li diris: “Mi vidis tion hieraŭ ĉe strato kie mi ne kutime promenas. Kaj ... mi fotis ĝin.”

— Steve EICHBLATT

Malinda



Leganto Enrique HARO fotis por ni la jenan ŝildon ce la meblo-vendejo *IKEA* en Austino, Teksaso.

Kutime la nomoj ĉe *IKEA* estas svedaj, sed ĉi tiu havas signifon – supozeble ne intencan! – en ankaŭ nia lingvo. (Aŭ eble la reklamistoj volis averti nur esperantistojn pri aparte senmerita varo.)

— Enrique HARO

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵo de Izaak MOORE.